



**Pasio**  
amo en sia plej  
malalta grado,  
tamen amo

# RETBUTIKO DE EASP

Loja da EASP

Categorias Digito para pesquisador e professor escritor

Entrar Cartão

## Morto de artista

Anna Löwenstein



### RELACIONADO

### Entre aspas



Paulo S. Viana

POETA, TRADUTOR, PRELATORATE  
 "Mi esperantistaĵo kiam mi aĝis 12-jara. Mi povas averti, ke tiu estas decida faktoro en mia vivo. Mi volas tute alia persono, sed mi ne havis Esperanton kaj ferencon al la mondo."



### EM DESTAQUE



Encantou-se com o Esperanto? Venha conhecer mais sobre alguns aspectos linguísticos e culturais da Língua Internacional com esta coletânea de ensaios, assinados por vários autores e compilados por dois estudiosos do fenômeno Esperantismo.

### EM FOCO

## O Esperanto Além da Língua

Organizadores: Fernando Pita/Guilherme Fiane

R\$ 40,00



### AUTORES EM DESTAQUE



Anna Löwenstein  
2.ª edição publicada



Gilbert René Ledon (1913 - 2003)  
1.ª edição publicada



Stea Johansson  
2.ª edição publicada



Tibor Schej (1924 - 1988)  
1.ª edição publicada



# Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**  
Dankon, Audino Rahsi!
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**  
Pli juna EASP
- 6 | **Literaturo**  
For la timo, ek al verkado!
- 8 | **Moderna vivo**  
Ĉu vi estas preta por vivi en la "metaverso"?
- 10 | **Iom da Filozofio**  
Pasio: amo en sia plej malalta grado, tamen amo.
- 12 | **Kino kaj aliaj artoj**  
Paralelaj patrinoj
- 13 | **Iom da poezio**  
panjo
- 14 | **Recenzo**  
Traduko kaj ties problemoj
- 16 | **El mia ĉiutaga vivo**  
Hazarda leciono
- 18 | **Opiniangulo**  
Intelekta formado en la brazila Esperantujo
- 19 | **Virtuala fenestro**  
Gilbert invitas al legado
- 20 | **Movado**  
EAsp intense laboras
- 21 | **Almenaŭ ridetu!**  
Manolo vizitas kuraciston

**Kovrilbildo:** Detalo el la artverko "Simpozio de Platono" (1869) pentrita de la germano Anselm Feurbach (1829 - 1880)

la lampiro

63-a jaro n-ro 175 2022:3

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
(psviana@terra.com.br)

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
easp.org.br | contato@easp.org.br

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José Roberto Tenório

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2022

Simple Membro ..... R\$ 200,00  
Subtena Membro ..... R\$ 400,00  
Ŝtatinterna Membro ..... R\$ 100,00

# Dankon, Audino Rashi!

Jen ni prezentas novan numeron de nia Lampiro. Jam de kelkaj jaroj ĝi aperas nur elektronike, kaj senpage alirebla. Ni klopodas aperigi artikolojn, kies enhavo estas kleriga, pensiga, politike neŭtrala, religie neŭtrala. Por la redaktoro, estus interese ricevi komentojn de la legantoj, por ke li taksu la taŭgecon de la laboro. Ĉu la revuo estas kontentiga, ĉu oni devus ion ŝanĝi, plibonigi aŭ variigi?

Cetere, preskaŭ la tuta agado de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo okazas virtuale, jam de pli ol du jaroj. La

pandemio tion kaŭzis, kaj tiu radikala ŝanĝo havas siajn avantaĝojn: nia kanalo en Jutubo multe evoluis, nia kafejo kunigis homojn por babilado, niaj kulturkunsidoj estas daŭre riĉenhavaj kaj diskutvekaj (dankon, Audino Rashi!).

Tamen, laŭ anonco de la organizantoj, EASP ĉeeste partoprenos en la ĉi-jara Brazila Kongreso de Esperanto, kiu inkluzivos ankaŭ nian Ŝtatan Kongreson. La evento okazos en la urbo Ribeirão Preto, en la monato novembro. Ĉu vi estas preta?

**Paulo Sergio Viana**



## Pli juna EASP

Al ĉiuj legantoj de nia amata revuo La Lampiro:

Estas granda plezuro ke mi estas ĉi tie por unu plia jaro. Mi estas certa ke vi, karaj legantoj, plu donos al ni kontribuon al nia EASP.



Prezidanto de EASP

Mi diras al vi ĉiuj, ke ni bezonas vian partoprenadon, por ke ni daŭrigu nian asocian agadon kaj eventojn.

En nia proksima ŝtata kongreso ni faros unuiĝon kun Brazilo Esperanto-Ligo, ni volas vian ĉeeston, por prestiĝo al la unua kongreso post la pandemio. Mi estas certa, ke ĝi estos sukcesa, se vi estos kun ni.

Mi volas peti de gejunuloj, kiuj partoprenas en nia afero, ke ili venu al nia asocio kaj membraro, alviciĝu kune kun ni por plibonigi nian EASP. Vi, gejunuloj, povas kunlabori en nia programo en la sociaj retoj, por atingi homojn, kiuj pensas simile al vi.

Mi volas, ke EASP estu pli nova, kun novaj ideoj, novaj sentoj, kun junaj personoj.

Mi dankas ĉiujn, kiuj legas nian revuon kaj komentas kun siaj geamikoj pri ni.

Brakumon al ĉiuj! Feliĉon al vi!

**Esmeraldo Aparecido de Alencar**

# For la timo, ek al verkado!

Eble vi jam aŭdis pri la Interkultura Novelo-Konkurso, jes? Jam estas la dua eldono de la konkurso kun la temo “Nokta Vojaĝo”. Tiu ĉi konkurso estas organizita de Akademio Literatura de Esperanto kaj Bobelarto. La celo de tiu movado estas instigi ke pli da homoj verku novelojn, kaj ke konsekvence ankoraŭ pliaj legu. Tiuj estas ege gravaj kulturaj trajtoj por apogi en ajna lingvo, kaj kompreneble ankaŭ en Esperanto.

Kiam vi pensas pri la ideo partopreni, jam aperas malĝentila voĉo en via kapo. Ĉu mi estas kapabla tion fari? Ĉu mi havas ŝancon elstariĝi en la konkurso? Ĉu mia ideo por verki ja estas sufiĉe bona por eniri en la konkurson? Tiuj dubemaj kaj nefidemaj rezonoj venadas tra la menso kaj kreas barojn por eĉ ion ajn ekfari.

Eĉ ĉar, kial strebi? ... Vi mem blinde fidas je tio ke vi ne gajnos, ne havas ŝancon. Estas tiel bonaj verkistoj ĉie! Kiel vi povus sukcesi, ĉu ne? Tiu juĝado



pri la ebleco fulme finas kaj kun tiom da kredemo, ke oni eĉ ne rimarkas ke tiu malĝentila voĉo estas tute malprava.

Mi donos al vi du kialojn.

Unua estas ke vi malpermesas ke via voĉo resonu tra la mondo. Estas ĝoje ke ekzistas pluraj bonegaj kaj laŭdindaj verkistoj. Sed kial tio signifas ke vi mem ne estas tiel bona verkisto kiel aliaj? Aŭ ke eĉ vi povas iĝi pli bona verkisto ol tiuj kiujn vi ŝatas? Kial vi eĉ ne donas al vi mem ian ŝancon provi aŭ iom fidi je vi? Ja ne sencas!

Due estas tio ke neniu iĝas sperta pri io sen praktiko. Do, kial vi kredas ke vi estas tiel speciala ke subite kaj magie vi majstre verkos? Komprenoble estas tio kion oni nomas talento, t.e. ia aparta kapablo krei ian arton. Sed, kredu ke se vi faras ion ofte, eventuale vi iĝos spertulo pri tio. Ne necesas serĉi malproksime por trovi ekzemplojn - nur memoru kiam vi lernis skribi aŭ paroli, kiam vi estis infano.

Tion dirinte, mi esperas ke tio iĝis pli klara por vi kaj instigis vin iamaniere. Kaj mi eĉ pli ĝojos se vi decidis ekverki! Do, mi proponas konsilojn por rememori dum via aventuro en la mondo de verkado

- 1- Faru, eĉ se kun timo! Nur faru!
- 2- Ne tro juĝu viajn kreaĵojn. Sufiĉas kiom aliaj juĝas, lasu tion al la ĵurio de la konkurso! ... Kaj kutime vi pli bonas ol vi kredas esti!
- 3- Ne eblas al ĉiuj plaĉi, do fokusiĝu pri tio, ke la verko plaĉu al vi mem!
- 4- Kion ajn vi faros, eble alvenos riproĉo aŭ juĝado - do, aŭskultu nur la konsilojn kiuj helpas vin pliboniĝi. Sed escepte de tio, fajfu kaj faru tion, kion vi volas.
- 5- Alproksimiĝu al homoj kiuj vin subtenas.

6- Bone kaj trankvile pripensadu pri kion vi celas rakonti, kiel rakonti kaj pri la proponata temo, kiu nun estas “Nokta vojaĝo”.

7- Petu ke homoj legu, komentu kaj reviziu vian novelon. Oni malfacile vidas siajn proprajn erarojn. Post relegado de via teksto plurfoje vi ne plu vidas viajn tajperarojn, vi bezonas freŝajn okulojn por tiu kontrolado.

8- Ne rezignu ĉe halto aŭ blokado. Faru ion alian. Via mensa fluo malstreĉiĝos kaj eventuale ia inspiro venos.

9- Tenu notlibron aŭ ian ajn manieron skribi, eĉ se per poŝtelefono. Oni ne havas rendezuon kun inspiro!

Mi jam scivolemas pri kion vi kreados ekde nun. Ideoj en la kapo, skribilo en la mano kaj ek! La Mondo atendas viajn rakontojn! Se vi interesiĝas pri la Dua Interkultura Novelo-Konkurso, vi povas scii pli ĉe la retpaĝo de Akademio Literatura de Esperanto: <https://www.akademio-literatura.org/ink>

Atentu! Limdato por sendi vian novelon estas la 30-a de septembro 2022.

**Anna Lobo de Carvalho**

# Ĉu vi estas preta por vivi en la “metaverso”?

La mondo ĉiam donas al ni novaĵojn, kaj nuntempe pro la rapida disvolviĝo de la teknologio, eĉ malfacilas akompani ilin. Unu ekzemplo pri la nuna defio estas la novaĵo nomita ‘Metaverso’. Bone, la vorto ne estas tiel nova, ĝi venis de la sciencfikcia romano "Snow Crash" de Neal Stephenson, en la jaro 1992.



La ideo ĉi tie estas ke ĝi estos nia "sekva universo" farita de la teknologia kaj noviga versio de la realaĵo. Jes, la virtuala realeco estos pli

proksime ol ni povas imagi. La virtuala realeco kiel ni konas ĝin hodiaŭ komencis formiĝi en la 1990-aj jaroj en la videoluda industrio, kaj oni povas diri ke la metaverso estus difinita kiel reto de virtualaj mondoj, kiuj provas reprodukti realecon, kun fokuso sur socia ligo.



La ideo ĉi tie estas ke la limoj inter la fizika kaj la virtuala realo estas ĉiam pli nedistingeblaj. Unu koncepto grava ĉi tie estas ‘avataro’. Ĉu vi scias kio estas avataro, en la virtuala mondo? Bone, ĝi estas ies korpa manifestiĝo en virtuala spaco, vere ŝanĝita aspekto de iu. Kaj do niaj avataroj fariĝas kontinuo de nia korpo en la ciferecaj mondoj. Vere ne estas afero de la estonteco, ĉar hodiaŭ jam oni povas mergiĝi enen de ciferecaj spertoj, kiel ekzemple tiaj ludoj kie oni vivigas nian avataron, kiel



la projekciita reprezentado nia. Jen la nova mondo jam inter ni!

La metaverso uzas teknologiojn virtualajn kaj de pliigita realeco por krei tiun metaverson. Ili povas esti aliritaj per akcesoraĵoj kiel okulvitroj kaj ankaŭ per protektgantoj, kiuj estas konektitaj al komputiloj aŭ inteligentaj poŝtelefonoj.

Nune vi jam povas decidi, kiu virtuala universo estos alirita. Decentraland, Axie Infinity, Horizon, Mesh, Sandbox, Fortnite kaj Roblox estas kelkaj el la nunaj plej serĉataj ciferecaj platformoj, ĉar ili ofertas diversajn spertojn, de videoludado ĝis virtualaj laborspacoj, kaj viva distro.

Fine, baldaŭ ni havos nian tutan korpon konektita al interreto, kaj tie nia avatara ricevos informojn pri niaj korpaj esencaj signoj, kiel sangopremo, temperaturo, korbato, ktp. Kaj pere de artefarita inteligenteco, subtenata de datumbazo, kun datumoj de



nia tuta vivo, ili prizorgos nian sanon, per nia avatara en la metaverso. Kun ĉiuj ĉi tiuj datumoj disponeblaj, ni ne plu malsaniĝos, ĉar preventa medicino ne permesus tion, agante antaŭ ol ekestas ia malbono.

Fine, mi opinias ke, se la etiko gvidos la novan mondon, oni trovos solvon por multaj san-problemoj, kaj helpos multajn personojn. Sed, se la etiko ne gvidos la homojn, per altruismaj valoroj kaj principoj, en tiu nova tempo, oni eĉ ne povas imagi kiom da novaj problemoj la homaro trovos.

Ĉu vi estas preta por eniri en ĉi-tiun novan mondon? Ĉu vi konsentas kun mi pri tiu ebla danĝero?


**David Bianchini**



# Pasio: amo en sia plej malalta grado, tamen amo.

*“Tio, kion ni ne havas, kio ni ne estas, kio mankas al ni: jen kion ni deziras kaj amas.”*


(Sokrato)



Sokrato

Eble pro tio, ke pasio multfoje kaŭzas suferon kaj eĉ perfortaĵojn, multaj diras, ke ĝi ne estas amo, ke vera amo inspiras nur bonaĵojn. Se viro, murdinte virinon, provas sin pravigi per la argumento, ke la viktimo ne reciprokis lian amon, oni kontraŭargumentas, ke “kiu amas, tiu ne murdas”.

Se oni konsideras, tamen, ke amo estas kompleksa, multgrada sento, oni nature akceptas, ke pasio estas simple amo ankoraŭ primitiva, burĝonanta, “arda kaj senbrida”, laŭ difino de PIV.



Platono

En la teksto “La Simpozio”, verkita

de Platono ĉirkaŭ la jaro 380 a.K., tradukita portugalingven kiel “La Bankedo”, kies ĉeftemo estas Eroso, la ĉeestantoj ne apartigas pasion disde amo. Por ili, ambaŭ havas la saman naturon kaj estas diversaj aspektoj de Eroso, la kosma principa motoro, kiu ĉion altiras kaj unuigas.

En sia origino, estante ankoraŭ pasio, la amo estigas tiom da sufero, kiom da plezuro, ĉar en tiu stadio ĝia esenca karaktero estas la manko. La pasiulo amas tion, kio mankas al li/ŝi.

La konsekvenco de manko estas deziro, do tiu, kiu amas pasie, vivas en konstanta deziro, neniam plene satiĝas. Sufiĉas momenta foresto de la amato por ke la amanto suferu kaj

timu definitivan perdon. Kaj se la amato ĉeestas, la plezuro, kvankam intensa, ne estas trankviliga, ĉar ĉiam ĉirkaŭvagas la ombro de la perdo.

Tiel emociigaj estas la sensaĵoj spertataj dum la pasio, ke ĝi ne povas daŭri por ĉiam. Kaj la korpo kaj la animo ne eltenus tion. Ĝi devas iel solviĝi. Se la amanto ne mortas aŭ freneziĝas dum la pasio, post kelka tempo ĝi velkas per unu el du eblaj motivoj: plena satiĝo aŭ plena elreviĝo.

Se la amato estas konkerita, malaperas la manko kaj sekve etiĝas la deziro. Sen sia ĉefa brulaĵo, la fajro de

la pasio iom post iom estingiĝas. Naskiĝas tiam la ebleco transigi la amon en pli supran stadion, pli mildan, malpli ekscitan.

Alie, se la objekto de la pasio iĝas neatingebla, la amanto komence spertas ŝajne senfinan angoron, kiu iom post iom malkreskas, ĝis alvenas kvietiĝo. Pro alkutimiĝo, forgeso aŭ eĉ pro laceco, la animo ne plu suferas pro tiu manko. Elirinte el tiu kora ŝtormo, ĝi ripozas kaj pretiĝas por daŭrigi sian iradon en la Erosa vojo, ne sciante ĉu en la sekva stacio renkontos serenan amon aŭ novan pasion.



## José Mauro Progiante

Simpozio de Platono - pentraĵo farita de Anselm Feuerbach



## Paralelaj Patrinoj

*Originala nomo: Madres Paralelas*

*Direktoro: Pedro Almodovar*

*Aktoroj: Penelope Cruz, Milena Smit kaj Israel Elejalde*

*Lando: Hispanio, 2021*

Almodovar estas hispana reĝisoro, kiu provokas la plej diversajn reagojn. Li estas ŝatata de multaj, tamen oni ankaŭ povas diri ke li estas tre alte taksita kaj estas tiuj kiuj tute ne ŝatas lin, laŭ la plej diversaj argumentoj. Mi estas inter la ŝatantoj. Mi ĝuas kiel li gvidas la historion, la enkadrigojn de la kameraoj, kolorojn... Estas interesaj rezultoj.

Vidante ke estas nova filmo de li en Netflix, mi decidis ĝuste ĝin spekti por recenzi ĉi-foje por vi! Ĝi nomiĝas "Paralelaj Patrinoj". Ĝi komenciĝas kun du virinoj – Janis kaj Ana – kiuj renkontiĝas en akuŝhospitalo, kiam ambaŭ je la sama horo kaj tago naskis siajn bebojn. Sen scii, iliaj beboj estis interŝanĝitaj.



Kiam Janis suspektis, ŝi faris DNA-ekzamenojn por certigi... kaj ja ŝi ne estis la patrino de tiu bebo, kiun ŝi kredis esti ŝia. Laŭ eblecoj kaŝe, ŝi faris la saman ekzamenon por vidi ĉu Ana estas la patrino de ŝia filino, kaj rezulto estis ja pozitiva, pravigante ŝiajn suspektojn pri interŝanĝo ĉe la malsanulejo.

Meze de tio – kaj kiel kontrapunkto pri la antaŭulecoj – Janis klopodis esplori pri sia praavo, kiu estis

*(Daŭrigota sur la paĝo 17)*


## Panjo

(Mário Quintana)

Panjo... jen nur kvin literoj  
En ĉi vort' de heroino;  
Samnombro estas ĉielo  
Sed ĝi enhavas senfinon.

Por laŭdi nian patrinon  
La tuta dirota bono  
Neniam grandos san' kiel  
La bon' de ŝia sindono.

Vorteto tiel malgranda,  
Rezonas io en mi,  
Samgrandas vi al ĉielo  
Nur malpli granda ol Di'!



Mário Quintana  
(1906 - 1994)



**Tradukis: Cícero Soares**


# Traduko kaj ties problemoj

VERKO: “LA TRADUKARTO KAJ TIES PROBLEMOJ”

AŬTORO: ANDRÉ CHERPILLOD

ELDONEJO LA BLANCHETIÈRE, 2003

(DUAELDONO, ABUNDE KOMPLETIGITA)



Se vi jam postlasis la elementan kurson, ankaŭ la daŭrigan kurson de Esperanto, kaj vi tamen avidas plu progresi en la posedo de nia bela lingvo — jen libro por vi. Se vi intencas fariĝi tradukanto/tradukisto en/el Esperanto — jen libro, kiu iom malkuraĝigos vin. Fininte la legadon de ĉi tiu eminenta verko, oni ricevas la impreson, ke bona, taŭga beletra traduko estas tiel malfacila, ke oni povas konsideri ĝin preskaŭ nebla tasko!

La aŭtoro listigas kaj pritraktas nekredeble longan liston da kaptiloj por tradukantoj: gramatikajn kaj leksikajn kaptilojn, internaciecon de esprimoj, neologismojn, proprajn nomojn, vortordon, kaj fine, la plej malfacilan: la Esperantan stilon. Pri ĉi tiu lasta li eĉ asertas, ke ne ekzistas metodo por

havigi al si la stilon: nur per dumviva legado kaj prinotado de bonaj aŭtoroj oni povas tion atingi. En tempo de fervora interretumado, fare de plej multaj samideanoj, ĉu restas libera tempo por atenta, malrapida legado kaj relegado de klasikaj kaj modernaj bonaj aŭtoroj?

Fine de la libro, li aldonis 21 francajn originalojn kun la respondaj tradukoj, faritaj de malsamaj tradukintoj, kiujn li konsideras supozeble “kontentigaj”; kaj ankaŭ 7 originalojn en Esperanto, kun la respondaj tradukoj en la francan, same “kontentigaj”. Sed li tuj atentigas, ke tute ne temas pri absolute perfektaj tradukoj.

Kurioza aspekto de ĉi tiu verko estas la severeco de la aŭtoro. Komentante iujn oftajn misaĵojn en la merkado en Esperanto, li de tempo al tempo uzas kolerajn epitetojn: "stulta", "krima", "ridinda", "absurda", "naiva", "kretena". Kaj unu lia admono limas inter ŝerco kaj krudeco: "Cetere, vortaroj ne estis faritaj por la hundoj".

La libro celas precipe franc-lingvanojn, ĉar ĉiuj ekzemploj pari gas Esperantaj kaj franc-lingvaj frazojn. Tamen, mi povas garantii, ke eĉ homo, kiu ne posedas la francan lingvon, multon lernos, nur atentante pri la Esperantaj frazoj kaj esprimoj. La aŭtoro kun mirinda detalemo klarigas plej subtilajn nuancojn.

Unu el la plej instruaj ĉapitroj estas tiu pri la vortordo en Esperanto.

Valoras la penon legi kaj relegi ĝin por definitive malaperigi la tradician, ofte aŭdatan informon (fare precipe de kursgvidantoj), ke ĝi estas libera en nia lingvo. Kaj li montras tion per amaso da ekzemploj, post kiuj oni ne plu forgesos ĝian gravecon.

Eble leginto de ĉi tiu libro finis la legadon kun la ideo, ke Esperanto tute ne estas "facila" lingvo. Tio dependas de la nivelo, en kiu oni uzas ĝin. Tradukado de altnivela literaturo certe postulas ĉiajn rimedojn por esprimado de subjektiveco, foje en alta grado. Kaj la konsola konstato estas, ke Esperanto ja permesas, ke kompetenta tradukanto atingu tiun nivelon. Denove ni konstatu, ke Zamenhof kreis mirindaĵon!

**(PSV)**

[easp.org.br/libroservo](http://easp.org.br/libroservo)



**Breno, Lilika**  
kaj la feroĉa hundo

Paulo Sérgio Viana  
Anna Lobo de Carvalho



**Teksto:**  
Paulo S. Viana

**Ilustraĵoj:**  
Anna Lobo

## Hazarda leciono

Kuranta jaro estis 1984... Mi ĵus translokiĝis al la bieno “Blua Arbaro” en internlanda urbo de ŝtato Goias... Naturo favoris agrablajn laboron kaj vivadon. Tamen ne sen alfronto de pluraj ankaŭ “naturaj” problemoj. La bienestro tre kompetente mastris la diversajn fendaĵojn

ĉiutagajn. Sed lia ripozo dum la nokto estis tre malagrabla, ĉar post laciga laborado dum la tago li ofte, iom antaŭ la kvara horo matene,

devis rapide ellitiĝi portante pafilon por defendi la kokinojn suferantajn ata-kon de nedezirata besteto: didelfo. Mi, ĵus veninta en kamparon, sentis ke Johano, la bienestro, meritas havi bonan ripozon kompanse de sia dedi-ĉo al zorgado de pluraj aliaj taskoj. Lun tagon mi decidis proponi solvon al tiu ĉi problemo: “Johano”, mi demandis, “Kia estas didelfo kaj kion ĝi ŝatas manĝi en la kokinejo?” Johano infor-mis al mi ke la besteto estas ne



malpli longa ol unu manlarĝo kaj ne pli longa ol manlarĝo kaj duono, kaj ke ĝi ŝatas mortigi kokinojn kaj manĝi parton de ĝi sed ankaŭ la ovojn de la

birdoj... Sed Johano volis scii la kialon de mia demando. Mi klarigis ke mi konstruos kaptilon por kapti la maloportunan animalon... Ĉiuj en la bieno dubis pri la efikeco de kaptilo ĉar la problemo jam de longe estas ĝena ĉe ĉiuj bienoj. Sed mi proponis riski tiukaze. Ili akceptis kaj mi konstruis la “kaptilon”, kiu tuj estis lokita ene de la kokinejo, provizita per unu ovo en strategia parto de la aparato. En la tuja frumateno ĉiuj sin



direktis al la kokinejo kaj entuziasme konstatis la kapton de nia “ĉaso”. “Ha, ne plu pafilon kaj ne plu ĝeno ellitiĝi frumatene”, ekkriis Johano! Dum kvar sinsekvaj noktoj, kvar didelfoj kaptitaj. Ĝuste tiam, post la kvara kapto, la bienistino, Ercilja, venis el la urbo, vidi la aferojn en la bieno kaj tuj demandis pri la mortigado de la birdoj... Ŝi ricevis entuziaman respodon: “Nenia mortigo plu, la problemo ricevis definitivan solvon”... “Kion vi diras? Definitivan solvon? Montru al mi “tiun” solvon!” Vidante la kaptilon ŝi tuj demandis: “Kion vi metas en la kaptilon por altiri la atenton de la ĝena besteto?” “Unu ovon”, estis la respondo. “Bela solvo, la via, uzante ovon kiel allogaĵon...” Tia riproĉo al la laboristo ege malplaĉis kaj

li dum du semajnoj simple forlasis la ideon zorgi pri la atako de la “murdanto de kokinoj”; malgraŭ mia insistado ne konsideri la riproĉon de la bienistino... Post du semajnoj, de malproksime, mi vidis Johanon eniranta la kokinejon kaj mi mem asertis: “li preparas la kaptilon...” Kaj en la sekva nokto nova didelfo estis kaptita... Dum la tagmanĝo mi trankvile provokis la bienzorganton: “Bela ago, vi uzante ovon kiel allogaĵon...” “Ne, tute ne, mi simple preparis la kaptilon sen iu ajn allogaĵo”, li respondis al mi... Finfine, tiom da suferigaj tagoj, pro “ne” konvena riproĉo, por lerni ke didelfoj simple eniras kokinejon kaj serĉadas manĝon vizitante kiun ajn truon ĝi trovas...

**Valdemir Moreira**

## Daŭrigo de la paĝo 12 (*Paralelaj patrinoj*)

mortigita kaj plej verŝajne entombigita en iu tereno dum milito. Ŝi volis ke Arturo, tiu kiu estus la patro de ŝia filino kaj specialisto pri paleontologio, klopodu eltrovi la veron pri ŝia pasinteco.

Kiel vi agus en ŝia situacio? Tre malfacile, ĉu ne? Mi kredas ke ĝi estas unu el la plej delikataj kaj malpezaj

filmoj de Almodovar. Cetere, mi sentis ĝin kvazaŭ bela omaĝo al tiuj kiuj suferis kaj trapasis ian militon kaj kvazaŭ kuraĝigo daŭrigi, malgraŭ misvojiĝoj. Mi provis ne multe rakonti pri la filmo, ĉar mia celo estas nur instigi vin. Mi deziras al vi bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo!

**Anna Lobo de Carvalho**

# Intelekta formado en la brazila Esperantujo

En nia Brazila Esperantujo ni kalkulas per unu mano la frukto-donajn Esperantistojn. Mi aludas al homoj kiuj dediĉas sin al Esperanto! Ili ne konas malplenan horon, ĉar ili ĉiam laboras por la nobla idealo! Tiel, ili surprizas nin per senĉesa intelekta produktado. La aliaj esperantistoj ne havas tempon, ne estas pretaj, ne deziras "aperi", ne havas "spiron", ne havas monon, ne povas halti pro sia laborego! Milojn da senkulpigoj sumas la Esperantistoj.

Sed Esperanto estas nun, ĉi tie, antaŭ ni! Ĝi ne atendas ke ni estu pretaj, ke ni finfine montrula vizaĝon, ke nia laborado permesu tion al ni!

Neniam Brazilo arigis tiom da universitatoj kaj universitatoj. Neniam Brazilo havis tiom da oportunejoj por labori kaj produkti. Neniam nia Esperantista komunumo estis tiom granda! Neniam la mondo estis tiom eta kiel nun. Post unu sekundo ni



povas interparoli kun ĉinaj amikoj, al rusaj kolegoj, kun kuracistoj japanaj!

Kio mankas por pligrandigi kaj fortigi Esperantujon?

Ŝajnas al mi ke mankas fokuso de la Esperantistoj.

Kiam la Esperantistoj deziros vivi Esperanton kaj Esperantigi la Vivon, eble ili trovos siajn oportunejojn kaj sukceson en la monda Esperantujo.

Do, kune, ni laboru!

Amike,

**João Otávio Veiga Rodrigues**

PDG 2016/2017 – D4560 Rotary International  
Sekretario de Rotaria Esperanto-Klubo – Brazilo

# Gilbert invitas al legado

Jam dum unu tuta jaro funkcias la Legoklubo Gilbert Ledon, de Esperanto -Asocio de San-Paŭlo. Sub la gvidado de Anna Lobo de Carvalho, Karlo Batalanto kaj Paulo S. Viana, dufoje en ĉiu monato, manpleno da legemuloj kunsidas por analizi kaj komenti unu literaturan tekston.

Dum ĉi tiu unua jaro de senĉesa funkciado, la grupeto legis 25 rakontojn troveblajn en la retejo Originala Literatura Esperanta (OLE), de la svedo Sten Johansson, kiujn li konsideras plej bonaj rakontoj originale verkitaj en Esperanto. Oni anticipe anoncas la laŭvican tekston, kaj ĉiuj klubanoj klopodas ne nur legi la tekston, sed noti novajn vortojn, interesajn esprimojn, belstilajn frazojn.

Fine, oni klopodas interpreti la tekston laŭ sia vidpunkto — kaj estas ĉiam tre kurioze, kiel varias la sentoj de la legantoj, koncerne unu saman tekston. (Kiel oni diras, leganto estas kunkreanto de literaturo!)

Entuziasmiga momento en la funkciado de nia klubo okazis, kiam ni ricevis la virtualan viziton de la konata hispana aŭtoro Jorge Camacho, kun kiu ni povis babili kaj starigi demandojn pri lia rakonto “Neniam plu (ABC de amo)”.

La proksima programo, proponita de Anna Lobo kaj Paulo S. Viana estas alterna legado de rakontoj de Dostojevskij (senpage disponigitaj de la retejo sezonoj.ru) kaj de originalaj rakontoj de Sten Johansson. La unua rakonto de la rusa aŭtoro “Honesto ŝtelisto”, estigis viglan, interesan diskuton inter la legemuloj.

Literaturo estas grava aspekto de ĉiu lingvo. Esperanto naskiĝis kun literaturo, ekde siaj unuaj tagoj, danke al la klarvido de Zamenhof. Se oni volas alproprigi la spiriton de nia lingvo, ni devas ĝui ties literaturon.

Gilbert Ledon invitas: partoprenu en nia legoklubo!

**(PSV)**

## EASP intense laboras

Dum la pandemio de la nova kronviruso, la sidejo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo restis fermita, kiel ĉiuj scias. Tio tamen ne signifas, ke la asocio ne aktivis. Tue male, la estraro regule kunsidis kaj precipe multaj anoj intense laboris en virtuala maniero. Pluraj programeroj okazis regule: EASP-Kafejo, Kulturkunsidoj (kune kun la Intervjua Areno), Legoklubo Gilbert Ledon, konversaciaj rondoj.

Krome, reaktiviĝis la jutuba kanalo de EASP, “Viva Gazeto”. En junio 2022 oni kompletigis la publikigon de 200 filmetoj de pluraj specoj. Dum la tuta ekzistado de nia kanalo jam okazis 44 135 spektroj en la kanalo. Ĉampiono estis ĝis nun la Lingva Provoko n-ro 1 (1327 spektroj). En la monato majo okazis pli ol 2000 spektroj en la kanalo, kaj la tempo de filmo-montrado estis 211 horoj. Enskribiĝis en la kanalo 859 personoj. Ripetaj spektantoj estas 313 personoj. En la monato majo, la plej rigardita filmeto estis “Renkonto en la Paraiba Valo (06/05/2022).



Esperable nia virtuala agado plu daŭros, ankaŭ post la pandemio. Ni invitas la anojn de EASP ne nur viziti nian kanalon, sed laŭeble kontribui por ĝia enhavo.

# Manolo vizitas kuraciston

Manolo venis al la okulkuracisto. La doktoro sidigis lin antaŭ ekranon kaj demandis:

— Kio estas skribita?

Li respondis:

— Mi ne scias.

La doktoro pligrandigis la literojn kaj demandis:

— Kio, nun?

— Mi ne povas legi.

La kuracisto provis per ĉiuj plej grandaj literoj, sed Manolo ankoraŭ nenion legis.

La kuracisto informis: via kazo estas severa, mi devos operacii vin.

Post kelkaj tagoj, ankoraŭ kun pansaĵo sur la okulo, Manolo demandis:

— Doktoro, ĉu mi sukcesos legi ĉion, post la operacio?

— Kompreneble. La operacio estis tute sukcesa.

Kaj Manolo:

— Hura! Kiel evoluis la medicino, doktoro! Antaŭ la operacio mi estis analfabeto!



# Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO  
MIA AMIKO**



**[pma.esperanto.org.br](http://pma.esperanto.org.br)**